



Esperanto en Danio

30-a jarkolekto • n-ro 4 Decembro 2023



Aruŝo – Tanzanio

3-10 aŭgusto 2024

Esperanto en Danio

Membroorgano de
Dana Esperanto-Asocio
www.esperanto.dk

Adreso de la prezidanto:

Peter Wraae
Eremitageparken 6,
2800 Lyngby
☎60 70 79 69 peter@wraae.dk
Ĝirokonto de DEA: 8411-41 88
386
UEA-kodo: deaa-t

Kromaj estraranoj:

Peter Wraae (Prezidanto DEA)
Ileana Schrøder (vicprezidanto)
Finn Østerbæk (kasisto)
Jens S. Larsen (sekretario)
Bent Jensenius
Pia Wettergren

Redakcio kaj aranĝo

Louise Wangberg kaj Ileana
Schrøder.

Presado:

Hellbrandt Trykcenter

Adresanĝoj al:

Finn Østerbæk ☎24 96 04 45
finnoesterbaek@gmail.com

Represo de artikoloj el EeD
estas permesata kun indiko de la
fonto.

Artikoloj por la venonta eldono
estos volonte ricevataj ĉe la
adreso:

**eed@esperanto.dk pri:
1.2.2024**

Enhavo

Novajtoj de Danio	3
Gazetaj Komunikoj de UEA	4
Gazetaj Komunikoj de UEA	5
Novajtoj de UEA	6
Persona raporto	7
Pri la venonta kongreso	8
Pri la venonta kongreso	9
Kalendaro	10
Socie – La Kultura Nokto	11
Aliaj aferoj en Esperantujo	12
Recenzo	13
Historio	14
Historio	15
Profesia kompreno	16
Filozofia posteno	17
Faktoj pri Esperanto	18
La vicprezidanto en Ĉinio	19
Daŭripo – vestaĵoj	20
La historia de la pomo	21
Transnacia historio	22
Transnacia historio	23
Someraj ferioj en Mezazio	24
Someraj ferioj en Mezazio	25
La lingva – Kazahio	26
Azenaj Oreloj	27
La dorso	

Novajoj de Danio

De la redakcio

Karaj membroj

Mi nomiĝas Louise Wangberg kaj mi estas kunredaktoro ĉe Esperanto en Danio. La temo de ĉi tiu numero kolektas. Kolekti novajn sciojn, novajn perspektivojn aŭ tute konkrete kolektiĝi en la naturo.

Post multaj jaroj de la bonega laboro verki, starigi kaj disvastigi la revuon de la membroj, Jens elektis pasigi pli da tempo en iuj el siaj aliaj multaj ampleksaj projektoj. Interalie, lia esplorado pri Harald Bludentulo kaj lingvistiko.


Mi ŝatus danki Jens pro lia lerta kaj dediĉita laboro dum 20 jaroj.

Estas multe da laboro fari la revuon kaj mi antaŭĝojas komenci. Kune, Ileana Schrøder kaj mi preparos la enhavon de la revuo kaj espereble liveros inspiron kaj komprenon al vi legantoj.


Mi havas fonon kiel redaktoro de la studenta revuo de la universitato kaj komencis informan kaj internacian gazeton en Ĉinio kun 12 verkistoj. Estas mia intenco, ke la revuo alportos informojn pri agadoj kaj novaj enigaĵoj por konversacioj en Esperanto. Vi verŝajne rimarkos kelkajn ŝanĝojn kaj mi esperas, ke vi bonvenigos ilin.

Krome mi antaŭĝojas ricevi viajn artikolojn, enhavon kaj ideojn por la revuo, ĉar ĝi estas revuo de membro por membroj.

*Kun miaj sinceraj bondeziroj
Ileana kaj Louise, la redaktistoj.*



Ileana Schrøder



Louise Wangberg

Gazetaraj Komunikoj de UEA

Kontraŭmilita, porpaca deklaro de UEA, TEJO kaj ILEI

La daŭre raportataj novaĵoj pri la aktuala konflikto en Mezoriento reliefigas la sekvojn de militoj por la popoloj de nia mondo, aparte kiam ankaŭ civiluloj estas trafitaj per morto kaj suferado pro vundiĝo aŭ manko de necesaj vivrimedoj.

Ne nur en Mezoriento sed en pluraj mondpartoj okazas dekoj da perfortaj militaj konfliktoj, kiuj pereigas kaj suferigas senkulpulojn, ne esceptante infanojn.

Okaze de la UN-tago, la 24-an de oktobro (vidu la koncernan Gazetaran Komunikon 1136 de la 20-a de oktobro 2023) Universala Esperanto-Asocio ripetas sian firman subtenon de paca solvo de konfliktoj. Laŭstatute neŭtrala pri politikaj pozicioj, UEA, kun la subteno de TEJO kaj ILEI, tamen apogas konfliktsolvadon laŭ diplomaciaj kaj aliaj iniciatoj kaj rimedoj, grupe kaj individue. La Esperanto-parolanta komunumo celas progresigi la homaron al ĉesigo kaj eliminado de militoj, kaj al pli paca kunvivado per transnacia respekto al homaj rajtoj, kiuj inkluzivu lingvan, kulturan kaj socian justecon por popola interkompreniĝo.

La 10-an de decembro ĉi-jare okazos la 75-a datreveno de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, kiu donos al la popoloj la okazon reagnoski ĝiajn principojn kaj idealojn. Tiu ĉi deklaracio en pluraj artikoloj principe kontraŭstaras akcepton de daŭraj militaj konfliktoj. Ekzemple, neniu homo suferu "kruelan, nehoman aŭ sendignigan traktadon" (artikolo 5) kaj ĉiu havu la "rajton je vivnivelo adekvata por la sano kaj bonfarto de si mem kaj de sia familio" (artikolo 25).

La 24-an de oktobro, 2023

Universala Esperanto-Asocio deklaras sian aliĝon al tiuj principoj, laŭ artikolo 5 en sia Statuto: "bonaj internaciaj rilatoj kaj respekto al la homaj rajtoj ... estas por la laboro de UEA esencaj kondiĉoj". Ni strebas individue kaj kolektive kun TEJO, ILEI, samprincipaj organizaĵoj registaraj kaj neregistaraj, por krei la bazojn por daŭra senperforta kaj egaleca interkompreniĝo, celante al natura pacemo inter individuoj kaj popoloj, rekonante ĉies dignon. La iniciatinto de Esperanto, D-ro Ludoviko Zamenhof, inspiriĝis imagi alian mondon, en kiu respekto kaj toleremo anstataŭus perfortadon, kun espero ke nia parolkomunumo donus imitindan modelon por estonta tergloba socio regata de profunde paca interagado. ◀

La 24-an de oktobro, 2023

Universala Esperanto-Asocio (UEA)

Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO)

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI)

Novajoj de UEA

Virtuala kongreso de UEA

De la 23-a ĝis la 26-a de novembro 2023 okazos la 4-a Virtuala Kongreso de Esperanto (VK): <https://vk.esperanto.net>.

Ĝi jam fariĝis la plej grava kaj granda reta evento de Esperanto en la mondo!

Estas tre facile aliĝi! Kiel individua membro de UEA vi rajtas senpage aliĝi (sed nur ĝis la 13-a de novembro 2023). Se vi ankoraŭ ne aliĝis, faru per <https://vk.esperanto.net> - sufiĉas informi vian UEA-kodon (en la formato xxxx-x).

Post la limdato 13.11.23 povos aplikiĝi simbola kotizo. Se vi jam aliĝis, ni antaŭĝojas pro nia renkontiĝo dum VK!

Ni kore invitas vin subteni la eventon per donaco: tion eblas fari dum la aliĝo. Tiuj, kiuj donacos 50 EUR aŭ pli aperas kiel Subtenantoj.

Ankaŭ eblas konstante donaci

per: https://uea.org/alighoj/donacoj/virtuala_kongreso.

Dankon al vi, se vi donacos aŭ donacis!

Informoj kiel kontribui al la programo de VK kaj al la Virtuala Movada Foiro aperas en la Gazetara Komunikado de UEA: <https://uea.org/gk/1129> - Helpu disvastigi la VK-n inter viaj konatuloj! Al la antaŭaj VK-j aliĝis ĉ. 2000 homoj kaj ĉ. 90 landoj aŭ teritorioj estis reprezentitaj.

Kaj vi estas parto de tio!

Elkorajn salutojn,

UEA.org ◀

Persona raporto


Impresoj pri la kongreso en Torino

Post iom da malfruiĝo mi bonorde atingis mian hotelon en Torino. Estas ĉiam nekredeble emocie kaj bele ĉeesti Solenan malfermon de la kongreso kaj samtempe povi saluti kaj konatajn kaj novajn esperantistojn.

Tre plaĉis al mi la vortoj eldiritajn de Andrea Bocelli (mondkonata kantisto). Li multe kuraĝigis nian movadon pro nia firma kredo kaj laboro, samtempe la portantojn al justeco en la mondo.

En la ĉirkauaĵo de mia hotelo mi facile povis piede atingi malnovan kastelon de Valentino, mezepokan Vilaĝon kaj la Fontanon de 12 monatojn konstruitan ek de 17 - a jarcento. Mi promenis kaj ĝujis parkon apud la rivero Pado kaj eĉ havis neatenditan surprizon de la virino kiu sidis agrable sur unu benko kun sia amiko. Ŝi estis scivolema pri mia ŝildo. Ŝi multe surpriziĝis kiam mi rakontis al ŝi pri la lingvo al ŝi tute ne konatan. Ŝi montris plian intereson kaj mi rekomendis al ŝi interretan informon pri la afero.

Tre impresis min la prezento de la venonta kongreso en Aruŝa en Tanzanio. Estis profesia kaj aloga, mi tute certas ke ĝi kiel unua E-Kongreso en la Afrika kontinento donos al ni novajn impulsojn. ◀



Ana Røssum



Pri la venonta kongreso

Internacia Kongresa Universitato

Registriĝo kiel parolanto

Kadre de la 109-a UK en Aruŝo, Tanzanio, okazos la 77-a sesio de la Internacia Kongresa Universitato (IKU). UEA invitas proponojn por IKU-prelegoj, kiuj estu sendataj al la IKU-sekretario amri@huji.ac.il plej laste la 31-an de januaro 2024.

Kiel en Montrealo kaj Torino, la IKU-prelegoj estos hibridaj, do eblos prelegi per Zoom, kvankam ĉeestaj prelegoj estos preferataj.

La proponoj estu pri interesaj, allogaj temoj kaj taŭgaj por klera publiko. Ĉiu propono enhavu mallongan resumon de la prelego kaj koncizan biografieton de la preleganto, ĉiu de amplekso de proksimume kvin linioj. Aparte estas bonvenaj proponoj de personoj, kiuj ne jam aŭ malofte prelegis en IKU. La proponoj estos profesie prijuĝitaj de la IKU-komisiono. Tiuj, kiuj ne estos elektitaj por la IKU, povos tamen esti konsiderataj por la SK. Ĉiu preleganto devas esti kongresano kaj mem zorgi pri sia aliĝo (<https://uk.esperanto.net/2024/>).


Akceptita IKU-prelego estos rekompencita per honorario de 240 EUR. Por IKU-AIS-kurso la honorario estos 300 EUR kaj por Scienca Kafejo – 120 EUR. Pliaj detaloj kaj antaŭaj prelegoj kaj resumoj troviĝas en la retejo de IKU: <https://uea.org/kongresoj/universitato>. ◀

*Kiel la Rektoro estis nomumita d-ro Élisée BYELONGO, de Kongo
D.R. kaj Sud-Afriko.*

Universala Esperanto-Asocio

Pri la venonta kongreso

Aruŝo, Tanzania



La venonta universala kongreso, la 109-a, estos la 3a ĝis 10a Aŭgusto 2024 en Aruŝo en Tanzania.

La regiono de Aruŝo loĝigas pli ol 2 milionojn da homoj. Ĝi troviĝas je la orienta branĉo de la Granda Rift-Valo, sub modera klimato. La grandurbo estas proksima al la Nacia Parko Serengeti, la Konservada Areo Ngorongoro, la Nacia Parko Lago Manyara, la Gorĝo Olduvai, la Nacia Parko Tarangire, la Monto Kilimanĝaro kaj la Monto Meru en la Nacia Parko Aruŝo mem.

Partoprenkotizo por plenkreskuloj de individuaj membroj de UEA el Danio estas 190 ĝis 31.12.2023. Post tio, la prezo altiĝas ĝis 290. Ĉi tiuj estas ekskluzivaj agadoj kaj restas.

La temo ankoraŭ ne estis difinita. ◀

Universala Esperanto-Asocio

Kalendaro

Aranĝoj de KEK

Legu pli ĉi tie: <https://esperanto.dk/kalendaro/>

Novembro

- 6a: KEK je la 19-a horo: Esperanto en la Roskilde Festivalo
- 17an: Aarhus Esperanto-Klubo
- 20a: KEK je la 19-a horo: Muzikvespero
- 23a-26-a: Virtuala Kongreso de Esperanto

Legu pli ĉi tie: <https://vk.esperanto.net>

Decembro

- 4a: KEK je la 19-horo: Nostalgia vojaĝo
- 16a: KEK je la 14-horo: Zammenhoff festo
Ĉe la kulturdomo Pilegården, Brønshøjvej 17, 2700 Brønshøj, en la malantaŭa domo (i baghuset). * Kotizo 50 kr.

Januaro

- 8a: KEK je la 19-horo: Pri la kristnaska ferio kaj pri la pasinta jaro
- 31-an: IKU – Limdato por proponojn por IKU-prelegoj

Februaro

- 1a: Limdato por artikoloj por Esperanto en Danio
- 19a: KEK je la 19-horo: Ĉina vespero

Aranĝoj de Aarhus Esperanto-Klubo

- 17an de novembro je la 19.30 en Folkestedet, Carl Bloch Gade 28, 8000 Aarhus C
- 15an de decembro je la 19.30 en Folkestedet, Carl Bloch Gade 28, 8000 Aarhus C

Universala Kongreso

- 3a ĝis 10a Aŭgusto 2024, Aruŝo Tanzanio

Socie

La Kultura Nokto



La Esperanto-klubo en Kopenhago estis reprezentita ankaŭ en la Kultura Nokto la 13-an de oktobro. Ni ricevis 16 interesatajn vizitantojn, du adoltojn kaj 14 junulojn. Estis denove plezuro paroli pri Esperanto kaj aŭdi pri la multaj aliaj lokoj kiujn ili devis viziti. La Kultura Nokto estas vespero kie institucioj, organizoj kaj kompanioj invitas la scivolemulojn enen. Vi povas ekz lerni pri Esperanto kaj aliaj asocioj kiel la famaj patkukoj de la urbodomo kaj la Rigshospitalet.



Aliaj aferoj en Esperantujo

Reklamilo

En septembro DEA reklamis en la vizaĝlibro (facebook) pri aŭtunaj kursoj de Esperanto. Jen la rezulto de la kampanjo:

Nombro de prezentadoj de la anonco = 13.693

Pensoj kiuj rigardis la anoncon = 7.427

Interagoj:

Pliaj reagoj: 118

Disdonoj = 8

Komentoj = 24

Deklaracio pri homaj rajtoj

Ĉi-jare oni festas la 75-jariĝon de la deklario pri homaj rajtoj, al kiuj, kiel vi scias, la Esperanto-movado estas ligita plurmaniere, de la momento de la redaktado al la statuto de UEA kaj al la subteno, kun ili donas al nia laboro kontraŭ diskriminacio bazita sur lingvo. do, indas kunfesti kaj kun la oficejo de UEA ĉe UN nun estas ellaborata plano, kiu kunligas tiun feston kun nia tradicia Zamenhof-festo. momente mi nur anoncas tion kaj petas vin traduki al via lingvo la jenajn vortojn:

Tago de Homaj Rajtoj

10 decembro 2023

Digno, Libereco kaj Justeco por ĉiuj homoj kaj ĉiuj lingvoj

Homaj Rajtoj,

Kiuj utilos por realigi afiŝon en via lingvo kiel tiun, kiun mi aldonas al ĉi riu mesaĝo.

Renato Corsetti

Recenzo

La Kurioza incidento de la hundo en la nokto



La Kurioza incidento de la hundo en la nokto

Mark Haddon kaj Simon Davies

La libro estas skribita en 2003 kaj esperantigis ĝin en 2022.

284 paĝoj

La rakontanto estas Kristoforo, knabo de 15 jaroj – tamen tiu libro ne taŭgas nur por adolenskantoj, mi diru!

Nun io pli de Kristoforo; li loĝas kune kun sia patro en angla urbeto, kie ĉiuj konas unu la aliajn en la najbareco. La patrino mortis antaŭ du jaroj; tiel rakontas la patro.

Estante aspergerulo, li frekventas specialan lernejon, kaj li vere estas geniuo pri matematiko kaj fiziko. Kiam li sentas sin streĉata, li solvas komplikajn matematikaĵojn enkapo.

Lia sindromo de Asperger efektive minimumigas lian vivon. Tamen li havas tiom da forto kaj espero por sia vivo. Survoje, kaj mense kaj reale, Kristoforo ekkomprenas, ke kaj la vivo kaj la vero povas esti komplikaj. Kvankam li ne kaptas kialon por mensogado-do li akiris per tiu travivaĵo la sperton, ke homoj kelkfoje mensogas por protekti sin mem!

Tiu libro estas facile legebla kaj leginda, kaj kortuŝa, kaj mi eklernis tiom da fivortoj! ◀

Pia Wettergren


Historio

Pri nova renkontiĝo

Iam estis juna virino nomata Lærke, kiu sentis sin kaptita en sia vilaĝeto. Ŝi sopiris sperti la mondon kaj kolekti feliĉon, spertojn kaj vivsperton. Iun tagon ŝi faris decidon kaj pakis simplan sakon kun kelkaj posedaĵoj kaj ekiris aventurecan vojaĝon.


Dum sia vojaĝo Lærke renkontis multajn defiojn kaj renkontis malsamajn homojn. Survoje ŝi lernis la valoron de lingvo, amikeco kaj la kapablon debati kaj akcepti malsamajn vidpunktojn.

Sur ŝia vojo, ŝi trovis saĝan maljunulinon nomitan Agnete, kiu priskribis kutiman pensadon kaj sekurecon kiel kontraŭstarajn vidpunktojn al la propra scivolemo de Lærke. Agnete diris: "Kelkaj homoj timas ŝanĝon ĉar ili estas sekuraj en la konata. Sed se vi kuraĝas defii kutiman pensadon kaj elpaŝi el via komfortzono, vi malkovros novajn horizontojn de ĝojo kaj saĝo."



Historio

Pri nova renkontiĝo



Poste, Lærke renkontis du karakterojn, junan viron nomitan Elias kaj pli maljunan virinon nomitan Ingrid. Ili havis malsamajn lingvojn kaj manierojn debati. Lærke estis fascinita per ilia konversacio kaj demandis al ili kiel ili povis havi tiajn malsamajn perspektivojn.

Elias diris: "Mi kreskis en urbo kie ni lernis debati intense kaj kun pasio. Ĝi estas nia maniero esprimi nin kaj defii unu la alian por atingi la koron de la vero."

Ingrid, kiu devenis el pli malforta kaj pripensema kulturo, aldonis: "Mi ĉiam lernis, ke aŭskultado estas same grava kiel paroli. Ni taksas komprenon kaj respekton por malsamaj vidpunktoj."

Lærke kolektis tiujn ilojn kiuj helpis ŝin sur ŝia vojaĝo. Ŝi lernis defii kutiman pensadon, akcepti ŝanĝon kaj kompreni, ke la diverseco de lingvoj kaj formoj de debato riĉigas niajn vivojn. Ŝia vojaĝo daŭris, plena de scivolemo kaj malfermo al la trezoroj kiujn la mondo havis por proponi. ◀

Louise Wangberg

Profesia kompreno

Kolekto: Tradicia praktiko kun daŭripovo en menso

Furaĝado implikas kolektadon de naturo, kaj ĝi kovras ĉion de manĝeblaj plantoj kaj fungoj ĝis dekoraciaj floroj kiel sambukaj floroj kaj beroj kiel rubusoj. Ĝi estas praktiko kiu postulas respekton por naturo kaj daŭrigebla aliro. Ĉi tio signifas, ke kolekto devas esti farita zorge kaj respondece. Orientu vin pri lokaj asocioj, gvidataj vizitoj kaj la retejo de la municipo se vi estas nova.

Kelkaj areoj povas havi restriktajn por protekti naturon kaj biodiversecon. Kolektu nur tion, kion necesas kaj lasu sufiĉe por ke plantoj kaj fungoj regeneriĝu.

Renkontiĝo estas maniero konekti kun naturo kaj lerni vivi en harmonio kun ĝi. Tial estas loko por ĝi en nia moderna mondo, ĉar ordinara promenado povas esti kombinita kun alporti ion manĝeblan hejmen kaj lerni pli pri naturo.

Se vi bonŝancas, vi povas trovi cervokornarojn en la arbaroj, precipe en Jutlando kaj Fueno.

De septembro ĝis februaro vi povas kolekti fungojn, prunelberojn, sorbalberojn, sovaĝajn pomojn, albiron kaj kratagajn berojn. ◀

Danmarks Naturfredningsforening



Jen listo de aĵoj kiuj povas esti rikoltitaj en arbaroj ĉie en Danio:

Fungoj: Vi povas trovi ampleksan elekton de fungoj, inkluzive de ĉantreloj, fungoj kaj Karl Johan-fungoj.

Beroj: Trovu sovaĝajn fragojn, mirtelojn kaj mirtilojn, rubusoj estas pli oftaj en Jutlando kaj Funen.

Herboj: Kiel urtiko, kolidoj, ceboleto kaj soro.

Filozofia posteno

Turmenta Songô

Lastatempe mi songîs pri 2 knaboj kun kiu mi kune frekventis bazlernejon. Ambau koncernaj knaboj, nomiĝas Niko, kaj por distingi ilin ni nomis: Niko Forte kaj Niko eta, ĉar la unua Niko ne nur estis forta sed ankau alta.

Niko Forte havis malfacilaĵon legi la vortojn kaj pro tio li suferis kelkajn mokojn. Ne ĉiujn primokis lin ĉar ni sentis ke li ne kulpis. Li videble kaj silente suferis.

Neniu en la klaso inkluzive nia instruisto, havis scion pri la malsano nome (dyslexio) kio signifas malkapablo legi vortoj. Eta Niko estis ekzempla en ĉiuj rilatoj kaj li certe ne primokis sian kunlernanton.

Mi, songe pri ili estis surprizita pri subita eldiro de Niko Forte ĉar li diris:

Kiam la tempo bonvenigos la lingvon Internacian, tiam nia globo iĝos brila pro la nova sunleviĝo.

Eta Niko replikis: " Mi samopinias!"

Mi volas aldoni mian klarigon al la legantoj.

Jen!

Karaj legantoj,

mia songo-historio estas autentika kaj unua songo kiu tusas internacian lingvon. La unua persono nome Niko Forte por mi pravigis sian kromnomon per sia visio kaj por mi li vere estas forta . La eta Niko konsentis pri la vizio de Niko Forte.

Mi ne memoras ke mi iam parolis kun ili pri mia rilato al internacia lingvo. Por tio mi nomis mian songon " Turmentan".

Oni libere povas interpreti mian songon au flanken iri de ĝi sed mi ne povis, do mi decidis rakonti ĝin. Entute kion estonte ĝi signifos neniu scias eĉ ne mi. ◀

Ana Røssum

Faktoj pri Esperanto

La bahaismo vidita per la okuloj de Lidia Zamenhof

Lidia konsideris Esperanton la ĝusta lingvo, priskibita en la sanktaj skribaĵoj de la profeto Bahá ú lláh. Vero estas, ke la bahaismo je certaj punktoj similas al la esperanta vidpunkto; mi pensas pri la homaro kiel familia rondo, socia harmonio, internacia lingvo kaj paco surtere. Cetere ĝi instruas toleremon ĉe plej alta nivelo, simile al la esperanta koncepto.

”La tero estas nur unu lando, kaj la homaro la civitanoj” (Por ke la tagoj estu pli lumaj p.98)

Evidentiĝas, ke Lidia estis pasia kredantino. Ŝi deĉikis amason de sia vivo, disvastiĝante ĉi tiun religion. Kvankam ŝi, estante la filino de L.L.Zamenhof, estis devigita funkcii kiel idealo por aliaj esperantistoj, ŝi persistis skribi, informi kaj instrui la bahaismon.

En iu prelego, ŝi asertis, ke Esperanto estis kreita sub tia religia influo!

Do, tiu religio vere allogis ŝin. Dudek unu jar-aĝa ŝi konatiĝis kun kaj la bahaismo kaj iu virino, nome Martha Root, kiu volonte enkondukis ŝin pli profunde. Nur unu jaro poste Lidia mem komencis partopreni bahaismajn fakkunsidojn dum U.K.

Ankaŭ pilgrimadon al Palestino ŝi baldaŭ faris por spekti la sanktejojn, kiuj troviĝis tie.

Ŝajnas kvazaŭ nekredeble, ke ŝi kapablis tiom rapide aliĝi al religio iomete esotera, kaj almenaŭ je la 1920-aj jaroj ne tiom konata en Eŭropo, mi konjektas. Ĝi originas el Irano.

Se nazioj ne pereigintaj ŝin, mi kredus, ke ŝi tamen ne povintus konvinki la homaron pri la bonaj efikoj de la bahaismo. Krome ŝia argumentado estas bombasta kaj meandrianta laŭ mia persona vidpunkto.

(Estante ĉiam scivolema, mi rete malkovris la fakton, ke ĉi tiu religio hodiaŭ asertas havi tricent tridek samideanojn t.e. nur en Danujo! Krome ilia hejmpaĝo uzas la esprimojn de Lidia!) ◀

Pia Wettergren

La vicprezidanto de ILEI instruas nuntempe Esperanto en Ĉinio



Mia prezentado de Eo al studentoj de Zaizhuang

Hodiaŭ mi prezentis miajn filmetojn en Esperanto (la animacion "Saĝa Steleto", "La lumo de la estonto" por la Usona Filmfestivalo kaj la okan parton de la Homa Ĉeno laŭ la ideo de Max Garcia) al 150 gestudentoj de la Departemento de Fremdaj Lingvoj de Zaozhuang-Universitato. Ankaŭ du el miaj Esperanto-studentinoj venis por filmi la eventon, kiu estis hibrida kaj la kvara evento de la celebrado por la dekjariĝo de la Esperanto-Muzeo. La studentoj estis interesataj kaj restis ĝis la fino, eĉ se la respondeca instruisto devis iri al alia kunveno. Ili precipe ŝatis la animacion kaj la Homan Ĉenon, kiun ili trovis tre kolora. Mi ankaŭ iom enkondukis Esperanton kaj instruis al ili kelkajn salutojn kaj simplajn frazojn, demandante al ili, pri kio ili scivolemas (Vi estas belega. Ĉu vi havas koramikojn? Ĉu vi jam manĝis? Ktp).

Alessandra Madella

Daŭripovo - fokuso sur la konsumo de vestaĵoj

Daŭripovo ampleksas larĝan gamon de aspektoj, inkluzive fari respondecajn elektojn por renkonti la bezonojn de hodiaŭ sen endanĝerigi la bezonojn de estontaj generacioj. Ni scias pri konkretaj rimedoj kiel ŝpari akvon, malŝalti la lumojn, eviti trokonsumon de manĝaĵoj kaj bicikladon.

Por vere progresi en la kompania flanko, EU enkondukis postulojn por raportado pri daŭripovo ene de 28 malsamaj parametroj. EU enkondukis devigajn raportajn normojn ESG (Media, Socia kaj Regado) por kompanioj. Ĉi tiuj normoj postulas kompaniojn raporti pri sia media kaj socia agado same kiel iliaj praktikoj, produktado kaj administrado. Ĉi tio kreas travideblecon kaj respondecon kaj instigas kompaniojn integri daŭripovon en siajn komercajn praktikojn.

Tri malsamaj aliroj al konsumo estas priskribitaj malsupre.

Ateliero Sardin: Ĉi tiu vendejo en Valby produktas vestaĵojn laŭmende kun fokuso pri kvalito kaj daŭripovo. Ili limigas produktadon al 25-30 vestaĵoj monate por eviti malŝpari rimedojn. La dezajnisto uzas sian Instagraman profilon por konsciigi pri klimata ŝanĝo kaj laborkondiĉoj en la teksa industrio.

Atter: Stine Højland, kreinto de Atter, aranĝas kudrajn kursojn por instigi aliajn kudri siajn proprajn vestaĵojn el forĵetita materialo. "Estas grave ne esti batita en la kapo de enradikiĝintaj kutimoj malfacile ŝanĝeblaj kaj havi vestaĵojn, kiujn vi volas porti", ŝi diras.

Asfalto: La butikoj Asphalt en Frederiksberg reuzas vestaĵojn kaj tablotukojn, kiuj ofte ankaŭ havas sentimental valoron. La dezajnisto Hanne Zachariassen volas, ke ŝiaj mankudritaj kreaĵoj instigu homojn uzi la vestaĵojn por pli longa tempo kaj tiel redukti malŝparon.

Ĉi tiuj iniciatoj estas ekzemploj de kiel malgrandaj entreprenoj en la moda industrio faras paŝojn al pli daŭrigebla produktado kaj defias la nunan kulturon de troproduktado. ◀

Danmarks Naturfredningsforening

La historio de la pomo

La patrino de la pomo

Kazaĥio, kiu cetere estas la malplej vizitita lando en Centra Azio, estas la loko en la mondo, kie la pomo devenas.

”Malus sieversii” malgranda pomo, kiu kreskas sovaĝe en la montoj de la suda Kazaĥio, estis montrita per genetiko kaj arkeologio kiel la prapatro de la moderna malsovaĝigiata pomo ”Malus domestica.”

Ĝis hodiaŭ oni daŭre faras cidron el la pomo, kiu pleje similas al tiu, kiun ni konas kiel paradiza pomo. La fruktoj estas malgrandaj kaj acidaj.

Estas konata, ke ”Malus sieversii” venis al Eŭropo en 3666 a.K., ĉar spuroj de la pomo estis trovitaj en elfosaĵoj en Norda Italio. La pomo vojaĝis tra la Silkaj Vooj, kaj estis amata de multaj popoloj kiuj rafinis ĝin. La romianoj precipe evoluis la kultivadon de pomoj al grandaj partoj de Eŭropo. La pomo unue venis al Danio en 1100 a.K., kune kun la monaĥoj.

Por ĉiu 10,000 pomkernoj, kiujn vi semas, 1 el la arboj iĝos manĝebla pomo. Tio estas, interalie, la kauso, pro kio oni greftas, kaj pro la sama kialo oni ne povas aĉeti novajn variaĵojn ĉe bredejoj (ekz. Pink Lady), ĉar daŭris longan tempon evoluegi ilin por disvolvi.

Amuza fakto: Apistaro, pro sia formo, ankaŭ nomita stelpomo en la dana, estas unu el la variaĵoj kiujn la romianoj kultivis kaj kiu estas ankoraŭ aĉetebla hodiaŭ. Sed se vi volus kultivi Malus sieversii, ankaŭ gxi aĉetebblas, se vi volas reiri ĝis la "radikoj". ◀

Jens-Peter R. Paulsen



Apistar



Malus Sieversii

Harald Bludentulo kaj transnacia historio

Ĉu Harald Bludentulo estis falsisto?

Kion faras Unesko kiam ĝi ne okupiĝas pri Esperanto? Nu, depost 1975 unu el ĝiaj gravaj agadoj estas la listo de mondaj heredaĵoj. Malsubre la monumentaro de Jelling kio mencias Harald Bludentulo kaj Thyra.

Harald Bludentulo venis de Norvegio, do eble kiam iu lia prapatro akiris teron en Danio la kutimo de runŝtonoj disvastiĝis ĉi tien.

Laŭ Peter kaj Birgit Sawyer, la malgranda runŝtono de Jelling estas falsaĵo farita de Harald Bludentulo.

La geedziĝo inter Gorm kaj Thyra egalas al alianciĝo inter la du plej potencaj familioj en orienta kaj okcidenta Danio. Ĝi vekis en la tuta popolo la esperon, ke nun fine estas klara kaj sekura monopolo de perforto en Danio. Plenumiĝis la revo pri enlanda paco

Thyra fariĝis la ĉefa simbolo de la Dana unueco.

Tio siavice konformas al la hipotezo ke la malgrandan runŝtonon de Jelling ne starigis Gorm, sed Harald, kiu volis ekspluati la popularecon de sia patrino.

La runŝtonoj sude de Jelling, kie Thyra estas menciita, estis starigitaj de ŝia bienadministranto. Laŭ ges-roj Sawyer tiu bienadminstranto estis la edzo de Thyra dum la mallonga tempo inter la morto de Gorm kaj la morto de Thyra mem. La doto de Thyra – orienta Danio – do estus heredota de ŝia nova edzo, kaj se ili ne havus infanojn, la heredo plupasus al ŝia familio en Selando. Tiam Harald ne plu povus pretendi esti reĝo super orienta Danio.

Sed se Thyra mortus antaŭ Gorm, ŝian doton heredus Gorm. Gorm siavice heredigus al sia filo Harald la reĝecon super orienta Danio. Tial gravis al Harald kredigi al la mondo ke Thyra mortis la unua.

Harald Bludentulo kaj transnacia historio

Hodiaŭ ekzistas la tiel nomata transnacia historio. Ĝi estas konata precipe pro la esploroj de la historio de sklaveco, sed ankaŭ la Esperantomovado, kiel transnacia fenomeno, ĝuas multe pli da atento de la historiistoj ol antaŭe.

Eĉ pli interese, tamen, estas ke transnacia historio ne nur atentigas pri novaj temoj. Ĝi ankaŭ povas radikale reinterpreti faktojn delonge konatajn al la nacia historio. La laboro de ges-roj Sawyer estas tipa ekzemplo de la transiro el strikte naciaj al transnaciaj vidpunktoj. Mi kredas ke ni kiel Esperantistoj devas treege interesiĝi pri tiu ĝenerala evoluo de la historiista profesio, kaj ne nur ĝui la pli altan prestiĝon kiun ĝi donas al nia movado. ◀

Jens Stengaard Larsen



Someraj ferioj en Mezazio

Ĉi-jare nia somera ferio 2023 okazis en Mezazio, pli detale en Uzbekion kaj Kazakstanon. La vojaĝo fariĝis urba ferio, kaj ni vizitis Taŝkenton, Samarkanton, Bukahareon, Astanon kaj Almaton. Ĉiuj urboj estis partoj de la malnovaj silkaj vojoj, kaj tial ili estas valoraj kaj historie kaj kulture.

Vojaĝajurnalo

Ni komencis en Taŝkento, kiu estas la ĉefurbo de Uzbekio. La urbo estas moderna, kun klaraj trajtoj restantaj el Sovetunio. Ne restis multaj historiaj konstruaĵoj, post kiam la urbo estis trafita de tertremo kiu detruis plej grandan parton de la urbo en la 60-aj jaroj.

En Samarkanto ni vere renkontis unu el la malnovaj silkvojoj urboj. Kun siaj multaj moskeoj kaj maŭzoleoj/nekropoloj, Samarkando havas riĉan historion. La moskeoj estas klare inspiritaj. La pano en Uzbekio nomiĝas Naan, same kiel en Barato, kaj la rizo, kiun oni mem ne povas kreskigi, estas importita el Ĉinio, por ilia nacia plado pilafo.

Bukaro estis miksita urbo. Multaj el la historiaj konstruaĵoj estis renovigitaj kaj la urbo havas centron en malnova arkitektura stilo, kie malnovaj kaj novaj konstruaĵoj staras unu apud la alia.

Astano estas moderna metropolo kiu, kiel Vaŝingtono kaj Kanbero, estas moderna ĉefurbo dizajnita por esti ĉefurbo. Ĉiuj vojoj do estas rektliniaj kaj ĉio estas tre moderna. La urbo klare portas la stampon esti nova kaj konstruita per la mono de la naftoprofitoj. Centre en la urbo staras monumento pri popola legendo pri aglo kaj ties nealirebla ovo, kiu plenumas al tiu deziron, kiu ekkaptas ĝin. (La sama legendo reaperas en ilia flago.)


Almato estas la malnova ĉefurbo kaj hejmo de la prapatro de la moderna manĝopomo. ◀

Jens-Peter R. Paulsen

Someraj ferioj en Mezazio



Tashkent, Uzbekio



Bukaro, Uzbekio



Astano, Kazakstano


La lingva situacio en Kazaĥio

Kazaĥio estas unu el la landoj kien la multaj malplimultoj estis deportitaj en la malnova Sovetunio (16 malsamaj etnoj), kaj oni do povas vidi tre miksitajn homamasojn. Uzbekio havas pli homogenan loĝantaron. Kvankam la kazaĥa estas parolata en Kazaĥio, ĝi ne estas la domina lingvo en la lando, tiu estas la rusa, kun 69%, kiuj parolas ĝin kiel gepatran lingvon. La rusa ankaŭ estas parolata en Uzbekio sed pli kiel la unua fremdlingvo.

Uzbekio uzas la latinan alfabeton, dum Kazaĥio uzas la cirilan. Tamen, Kazaĥio transiras al la latina kaj finos la transiron fine de 2025.


Kvankam la rusa estas tre domina en ambaŭ landoj pro historiaj kialoj, kaj multaj parolas ĝin kiel sian unuan fremdan lingvon, ambaŭ landoj havas siajn proprajn lingvojn, la kazakan kaj la uzbekan, kiuj estas ambaŭ lingvoj en la tjurka lingvofamilio. Ili do povas bone kompreni la turkan, same kiel skandinavo povas kompreni unu la alian. Ĉi tiu familio de tjurkaj lingvoj etendiĝas de Turkio tra Mezaŭro, ĝis Ĉinio kaj norde ĝis Jakutsk en Rusio. ◀

Jens-Peter R. Paulsen



Devastiĝo de lingvo en Mezaŭro

Azenaj Oreloj



Horizontale

- 3 Komenci
- 7 Parto de teatraĵo
- 11 Insektido
- 14 Eŭropa lando
- 17 Delikata kaj brila fadeno
- 19 Malsameco
- 20 Plej forta
- 21 Supra parto de cambro
- 22 Frukto kiu havas malmolan ŝelon
- 23 Konfidi plenumon de ago
- 26 Loko el kiu oni elfosas metalojn
- 27 Ago kontroli ĉu objekto taŭgas
- 28 Portebla ujo
- 29 Grandvalore
- 31 Laca
- 33 Greno
- 36 Fizika grando
- 37 En nedifinita tempo
- 38 Vivanta nur de tre mallonga tempo
- 39 Malkonvene
- 40 Rimedo por dormigi bebojn
- 43 Evento
- 44 Filmarto
- 45 Krio de hundo

Vertikale

- 1 Antaŭe pripensita kaj ordigita aranĝo
- 2 Argilaĵo por masoni
- 4 Paroli nacilingve
- 5 Nedifina pronomo
- 6 Transdoni monon
- 7 mll: artefarita intelekto
- 8 Ekskluziva rajto de aŭtoro pri uzo de lia verko
- 9 Buligi, krispigi
- 10 Haŭtmalsano
- 12 Malpeza metalo
- 13 Je la fino de la tago
- 15 Aparato por teni datenojn
- 16 Tre fruktodona
- 17 Oceaniano
- 18 Granda laŭ direkto
- 24 Produktaĵo de kokino
- 25 Ia nedefinita kvanto
- 29 Movi boaton per homforto
- 30 Finiĝi
- 32 mll: maksimumo
- 34 Maldormigi
- 35 Parto de vizaĝo
- 41 mll: Unuiĝintaj Nacioj
- 42 mll: notu bone



Universala Esperanto-Asocio

Tago de Homaj Rajtoj

10 decembro 2023

**Digno, Libereco kaj
Justeco por ĉiuj homoj
kaj ĉiuj lingvoj**

